



Registered at G.P.O. Melbourne, for transmission by post as newspaper.

LA SUDA KRUCO

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio. Fondita en Julio 1920.

(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:

BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj

Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondokupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

:: :: :: :: ::

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 145 (13th Year).

MELBOURNE (AŬSTRALIO).

1 OKTOBRO, 1932.

NEW PERSPECTIVES.

Provided the support of our present readers shows no slackening, it seems safe to announce that henceforth "La Suda Kruc" will appear, as this number, in double size, ten times a year. This has been made possible by an arrangement made by your editor with Mr. R. Rawson, who speaks for the Melbourne Esperanto Club and, in some measure at least, for the Sydney Esperanto Society and kindred bodies. It is gratifying to know that Mr. Rawson has been appointed by 3LO to give, from 1st October, lessons in Esperanto on alternate Saturdays at 7.25 p.m. In this course of lessons "La Suda Kruc" will serve as a useful auxiliary, for it will contain, among other innovations, Esperanto texts to be read over the air by the instructor. We therefore advise those following the course to have in their hands the current numbers of "La Suda Kruc" for use in this relation.

The format of our organ has been altered to take photographic blocks more conveniently, and the pages have been numbered afresh for binding purposes. Features appreciated in the old series will be retained in the new, which, by its increased content of interesting and useful matter, will, I trust, meet with the approval and support of every Esperantist who reads it.

(Editor.)

The success of our venture depends to a great extent on our exercising the strictest economy in administration. We, therefore, must from this number severely eliminate every fossilised accretion from our lists.

ESPERANTO AND RADIO IN AUSTRALIA.

For nearly nine years Esperanto has occupied a place in the programs broadcast from 3LO, Melbourne. During that time over five thousand letters have been received from listeners in all parts of the Commonwealth asking for particulars of how to learn the language. Inquiries have also been received from New Guinea and New Zealand, and a recent mail brought one from British North Borneo. Statistics show that approximately one third of those who write for information take up the study, and that more than 50% live in places far removed from big towns; in many cases on isolated sheep and cattle stations. Radio is thus doing signal service for Esperanto in Australia by introducing it to those who would have little chance of hearing of it otherwise.

The results have been so satisfactory that 3LO recently decided that, in future, lessons be given in Esperanto and that the broadcasts be fortnightly instead of monthly.

In a country of great distances like ours the difficulty has been how to retain the interest of the isolated student. How many of those who have taken up Esperanto in the past and have dropped it would have continued if a helping hand had been given at the right moment? The Editor of "La Suda Kruc" has therefore given permission for a radio column to appear regularly in the paper for the purpose of giving advance notice of Esperanto broadcasts in Australia and New Zealand. Intending speakers are therefore asked to send in complete information at the earliest possible moment.

The lessons from 3LO will be given on every alternate Saturday at 7.25 p.m., starting on October 1st. To help the beginners with the pronunciation the anecdotes appearing in the Beginners' Section of this magazine will be broadcast on the dates mentioned.

There are various ways in which you can help to make the Course a success: Firstly, by urging students to follow the Course; secondly, by expressing your approval to 3LO; thirdly, by sending helpful suggestions to the lecturer.

An announcement of the Course is contained in "Educational Broadcasts," which will be sent by 3LO to any applicant enclosing a penny stamp for postage.

ESPERANTO EN MELBURNO.

Okaze neesperantistoj montras surprizon eklerni, ke ekzistas en Melburno pli ol unu Esperanto Klubo, kaj demandas kial ĉiuj esperantistoj ne ĉeestas la saman rondon. Se oni pensas momenton, oni konfesos, ke ĉiu persono ne havas liberan la saman nokton en la semajno, ĉiu sole igas necesaj du aŭ tri klubojn.

Ĉiam du grupoj kunvenas en la ĉefurbo—kelkfoje pli. La Melburna Esp-Klubo havas sidejon ĉe la Aŭstralia Preĝejo, en Russell-str., kaj la Melburna Esp. Societo loĝigas ĉiunarde en la Scots Hall, samstrate. Estas granda grupo ĉe Coburg, kiu en Septembro festis la 3an datrevenon de sia starigo. Ankaŭ troviĝas grupoj ĉe Box Hill, Ringwood kaj aliaj antaŭurboj. Novaj grupoj formiĝis tiun ĉi jaron inter la senlaboruloj ĉe Port Melbourne, Richmond, Brunswick kaj Northcote, kaj ankaŭ ĉe la Unitarian Church kaj la Amikoj de la Sovet-Unio.

S-ro Clive Hughes gvidas klason de 20 samideanoj de la Brighton Teknika Lernejo, kaj malgrandaj privataj grupoj en diversaj lokoj studas la lingvon.

S-ro Lloyd Thornton, kiu lernis Esperanton ĉe la Melburna Alt-Lernejo, kaj tiam gvidis kurson tie, nun estas sukcese reviginta la movadon en Adelaide, kaj vigle kondukas entuziasman grupon.

S-roj G. Wallace, la Redaktoro de Edukaj Eldonaĵoj en Viktorio; H. Lanyon, la lernejestro de la Mitcham Statlernejo; Hamilton Webber, kiu kondukis la "State"-Teatra-Orkestron, kaj nun estas la konduktoro de la "State"-Teatra-Orkestro en Sydney, estas asociitaj kun la lingvo, kaj s-ro Hebbard, la lernejestro de la Croydon Statlernejo, kiel unua gvidis oficialan esperantan klason en la Ŝtataj Lernejoj (Post-Primary Course).

Troviĝas ankaŭ multaj solaj esperantistoj, kiuj ne aniĝas al iu grupo, sed uzas la lingvon por la legado kaj korespondado.

—M.C.

La Pyke Memoriga Ekzameno.

Tiu ĉi ekzameno okazos la 5an Novembron, 1932. La plej malfrua dato por la akcepto estas la 22a de Oktobro, 1932. La ekzameno okazos samtempe en tri ŝtatoj—Victoria, New South Wales and Queensland. Ĉiu kandidato, kiu komencis la studadon de Esperanto post la 1a de Novembro, 1931, rajtas konkursi por la premio de £5:5:0; tiuj, kiuj komencis la studadon de Esperanto antaŭ tiu dato, povas celi por atesto pri kompetenco. Oni ricevu ĉiujn detalojn de s-ro R. Rawson, 169 Exhibition St., Melbourne.

—M.C.

TO OUR SUPPORTERS

Thanks for the following. We seem, from the poverty of the list, to be slipping back again. Scores of last month's recipients had crosses on their wrappers denoting lapsed payment. We heard from two! Our progressive moves must be balked if our faith in you proves misplaced!

Miss Krass, 4/6, July, '33; her ad., 2/6; ad., 2/-; Mr. F. Thomas, 1/6 (gift); Mr. J. Mader, 5/-, Aug., '33; Mr. Waterman, 4/6, June, '33; Mr. Rawson (sales), 3/8; Mr. E. Cox, 4/6, June, '33; Mr. Jack, 10/-, June, '33; "Krizmono," 21/-; Mr. G. Gordon, 5/-, June, '33.—Total: £3/4/2.

AL KONTRIBUANTOJ.

Malofte, sed de temp' al tempo, ni ricevas verketojn neakompanitajn de ajna nomo. Lastatempe venis io tia, strofetoaro, de sennomulo. Ni devas klare diri, ke ni ne konsideras anonimajn kontribuantojn. Kun la verko la sendanto nepe enmetu ankaŭ sian nomon-adreson; kompreneble, se li volas, sur aparta slipe. Se la verkaĵo estas tradukita peco, bonvolu kune sendi la originalan.

Pri la poezio, ni aldonas, ke en "La Suda Kruc" pro principo ne aperas strofoj, krom nur en eksterordinaraj okazoj. Tiun principon ni antaŭ longe starigis por ne ofendi al la diversaj rimarkuloj inter niaj konatoj, multe el kiuj eĉ ne konas la nomojn de la plej grandaj Esp-aj poetoj. La Esp-a poezio, kiel tiu de ĉiu lingvo, postulas longajn jarojn da pacienca studado kaj tre fundan scion de la koncerna lingvo. Cetera granda parto de la "S.K." legantoj, inter kiuj estas forta proporcio de ĵuskomencintoj, prefere legas la prozon. Se poeziaĵoj aperus en "La S.K.," tiuj nepe estus tiuj verkitaj de la plej sendubaj majstroj eŭropaj, kies perfekte ĉizitaj ĵuveloj, merite vaste diskonigadon, ofte igas nin bedaŭri la supre menciitan principon.

(Administracio "S.K.")

VOĈO EL HUNGARUJO.

S-ro Ludoviko Totsche, redaktoro de "Literatura Mondo," skribas en la junio n-ro de tiu gazeto: "Kara s-ano Robo, en via recenzo de 'Viktimoj' ('La S.K.', Junio, 1931) la heroon antaŭatigis hungaro vi nomas ĉeĥo. Kial?" Nur pledebla estas, ke ĝi estas skribaro de tre aferoplena homo. Ni dankas al s-ro T. pro lia atentiga kaj intereso.

"ESPERANTO PER ESPERANTO"

Lernolibro laŭ rekta metodo; kun metodo enkonduko.

Prilaboris Leono Vianeno.
Eld. N. Ŝapiro, Warszawa Nowolipki 8, Poland.

Pg. 68; prezo unu ŝil.

La aŭtoro pretendas, ke per ĉi tiu lernilo li donas "novan kaj originalan sistemon por instruado de la lingvo laŭ senpera metodo al plenkreskuloj." Pri tio oni juĝu el ĝiaj kvar ĉeftrajtoj:—

(1) eble de instruado laŭ senpera metodo (t. e. ne uzante tradukan lingvon) konformigita al plenkreskuloj sen iuj ajn aliaj specialaj ilustraĵoj helpe de ordinariaj objektoj, kiuj troviĝas preskaŭ ĉiu ĉambro, tono, simplaj movoj kaj gestoj.

2) por eviti la enuigan sistemon de apartaj frazoj ne interligitaj per iu komuna senco, troviĝas eĉ en la komencaj lecionoj faciligaĵoj, rakontoj, kies primitiva stilo respondas precize la gramatikajn kaj vortajn sciojn de la lernanto eke koncerna leciono.

3) en ĉiu rakonto troviĝas nur tiaj formoj gramatikaj, kiajn la lernanto jam ekkonis en la antaŭaj lecionoj.

4) la gramatikoj estas klarigata laŭ indukta metodo, t. e. el specialaj ĉapitroj gramatikaj la lernanto mem konkludas koncernenajn regulojn."

Signife estas, ke la verkinto, instruante la -io finajon de la landoj, faris nenian mencion pri la oficialaj formoj kun -ij. La legaĵoj estas b-n-g-elektitaj; sed eĉ paĝo 48 "ling' e universal" devus esti "lingve universal." La verko plene valoras la prezon.—(Robo.)

Nyckel till Esperanto (Ŝlosilo de Esperanto). Laŭ la normoj de I.C.K. eldonita de Eldona Societo Esperanto, Stockholm, 1, 9a eldono, 100a-120a milo.

En malpli ol du jaroj vendite 20,000 ŝlosilojn, la sveda eldonejo esperantistaj reeldonis ĝin en 20,000 ekz. La nova eldono estas tute novkomposita kaj presita per klisoj. La vortaro estas iom pliriĝinta. La nova ŝlosilo donas tre agrablan impreson pro sia klara presoj kaj bona papero.

120,000 ŝlosiloj en la sveda lingvo, jen bona pruvo pri la multa laboro farita por nia afero!

"LA PENTROARTO EN LA MALNOVA HUNGARUJO."

Verás: Genthon Istvan.

Tradukis: Francisko Ŝilagi.
Eldonis: Literatura Mondo, Budapest.
72 paĝoj da teksto; 102 belaj ilustraĵoj.
Prezo 16/3, afranko 6p. e. B.E.A.

Verdire niaj hungaraj samideanoj, Literatura Mondo, montras altan gradon de kuraĝa fido, eldonante en la nuna malfacila tempo tiel malaktualan, fake specialecan verkon, kiel la recenzata. Kiom da homoj en Aŭstralio povus sen trea antaŭpreparo doni prelegon pri la supra subjekto?

Ni havas ĉi tie verkon pri temo ne ofte pritraktata en la artrondejo, kvankam la belaj bildoj de Sta. Elisabeto de Hungarujo kaj la rakonto pri la rozmiraklo estas iom vaste konataj en la mondo. La libro, lukse eldonita en duonlelo, meritas varman akcepton, precipe de tiuj interesataj de la mezepoka pentroarto. Ĉiu pentraj-galerio devus havigi ĝin al si, ĉar per ĉi Esperanta eldono estas eble konigi al ĉiuj popoloj de la mondo la antikvajn hungarajn trezorojn, alie tute ne diskoneblajn. Ĝi prezentas aron de bildoj tiritaj el la verkaĵoj de diversaj hungarlandaj pentristoj de la 14a kaj 15a jarcentoj kun paĝoj da informaj tekstoj. Ekskluzive kristanreligia estas la kolekto, en kiu la Pasiono de Kristo okupas grandan parton. En la mezepoka la religio de centimiloj da sinceraj sed simplaj, eĉ analfabetaj, homoj estis laŭ la vera senco de la vorto "enkonstruita"

en gotikajn templojn kaj en ties fenestrojn kaj murdekoraĵojn. El tio ni havas ankoraŭ inter la konservataj artobjektoj pli-malpli krudajn esprimajn de la piaj aspirantoj de tiu tempo, kaj ni povas hodiaŭ ekmiri, vidante kiel la religia fervoro tiel netrafis en konkretan formon la ekstazajn spiritmovojn de la santantoj. Konfesinde, tio estas vera eĉ ĉe la plej bele sukcesintaj ekzemploj de pli modernaj periodoj; sed ofte ĉi tiuj antikvuloj, en sia ama entuziasmo enverki iujn detalajn, groteske rompis bazajn principojn de la arto. Tamen la intensa por-Krista flamo brulanta en la koroj de ĉi tiuj fideluloj devas forte pledi por ili kaj certigade malseverigi la kritikemajn ni, homoj de l'hodiaŭa tago, kiam ni sidigas por ekzameni tiujn restaĵojn. Formo, perspektivo, proporcio, anakronismo, ĉio postulas de la modernulo simpatian indulgon. Sed kia kontrasto inter ekzemple, la Madono de Rafaele, aŭ iu bildo de Goja, kaj n-ro 27 de ĉi tiu kolekto, Madono kun sia infano; aŭ 15, Naskigo de Kristo! Aŭ plue, inter la suferplena Ecce Homo, konata de la Eŭropano jam de siaj infanaroj, kun la timiga figuro en n-ro 28, aŭ tiu en 90, Kalvario, en kiuj-ĉi mankas la potencaj, genereraj strekoj de Durer, la ĉiam simetriaj linioj de Rubens. Kiel klarigis cetera la absoluta supereco en la antaŭkrista arto, ekz., la staturo de Fidiaso kaj Praktisiles super tiu de la mezepokanoj?

Eble por la plimulto estas malfacile laŭdi el artisma vidpunkto la bildojn en ĉi tiu volumo, sed ĉiu pensanta homo el la profundo de sia koro admiras kaj respektas la nepre puran tributon de l'hungara nacio al la Dia Galileano. Vera tra la jarcentoj estas la Paŭla diro: "Dio elektis la malfortajn objektojn de la mondo, por hontigi la fortajn."—(Robo.)

"TRANS LA FABELOCEANO"

Originaloj de Francisco Szilagy.
Eld. "Literatura Mondo." Budapeŝto.
Pp. 135, prezo ĉe B.E.A. 35. 3p.

La aŭtoro, partredaktoro de "Literatura Mondo," jen eniras la vicon de la originalaj verkantoj. Rapide oni konstatas ke lia lingvaĵo, malgraŭ kelkaj neklaraĵoj, estas entute ĉiura, lerte fabrikita kaj evidente la cerebrofrukto de homo por kiu Esp-o estas pulsanta faktoro en la vivo. Sed samtempe multaj legemuloj elsciantaj la verkojn de la antaŭmilita "klaska" skolo de nia literaturo sentas ion tromodernecon kaj en la frazeologio kaj en la esprima formo. Sajnas ke la ĉefaj hungaraj Esp-aj verkistoj akiris por si ian prepon stilan kaj lingvajnan. Ekzemple inter la skriboj de Baghy kaj Forge ekzistas iom forta parenceco kiu cetero iagrade influas aŭ karakterizas ankaŭ la plumon de F. Szilagy. Kuras tra ĉi ties libro kelko de la elektrika elipseco, la frazara eksperimentemo de la nomitaj romanistoj. Komparu nur: p. 96 "skatolo da alumeto" kun "skatolo da cigaredo" (Viktimoj p. 136, Baghy) kaj p. 109, "Ni amos kaj punkto!" kun "Prenu la pantalonojn kaj punkto"

(Viktimoj p. 60). Cetera le esprimas ne estas klara. Atenta komparo de la stilo de Zamenhof en la traduko de la Andersenaj "Fabeloj" kun tiu de la nuntagaj hungaroj nepre scigas ke la verkoj apartenas al nesamaj periodoj en nia literaturo.

"Trans la fabeloceano," kies komencapartoj verŝajne plej plaĉas, ne estas porinfana legaĵo. Ĝi entiras en sian konsiston multon, kiu estas ekster la kompren-kaj ŝatpovo de l'etularo. Ni ne povas opini, ke S. verks ĝin por tiaj; sed por homoj kun ĉiam junaj koraj—plus provizo de terminoj propra al nia komplika hodiaŭa socio. Anstataŭ ĉi tiu fragmentaro ni preferus vidi ĉi tiu ambici-celan, ian romanon pri u el la pritraktindaj temoj el la aktualo. Sed super ĉi-kontribuo al nia "jazz"-literaturo multaj Esp-istaj vizaĝoj priride torigiĝas.

15. Stranga uzo de "sekre" sence de "pro tio ke"; 44, komencisto (komercisto); 69, "barberoj" (?); 77, "puritana," uzata pri la patro de Zamenhof, povas mispensiĝi; 85, "sordino" (?); "aktuala" (efektiva?); 89 "Ghandi" (Gandhi aŭ Gandhiji).—(Robo.)

SCOUTS LEARN ESPERANTO.

For the first time in the history of scouting a wireless station will be erected at the site of a jamboree, when, at the fourth world jamboree in Godollo, Hungary, next year, a station will transmit musical items, general information, and news to the outside world.

So anxious are Hungarian scouts to talk with their overseas brethren at the jamboree that many have learned Esperanto.

(Melbourne "Sun," 6/8/32.)

JUS APERISI!

La senpacience atendata, 10-a jubilea eldono de B.E.S.-Adresaro de Esp-istoj el ĉiuj landoj

kun pli ol 1100 adresoj kaj 110 portretoj el pli ol 40 landoj. Laŭprofesia kaj laŭinklina registro ebligas tiu trovi la deziratan adreson! Altvuala, belspekta, praktike aranĝita 120-paĝa jarlibro, bezoniga por ĉiu Esp-isto, estas ricevebla kontraŭ la vere eta monsumo Unu Sv. Franko (1/1 aŭ 4 resp-kuponoj aŭ egalvaloro) ĉe La Suda Kruco aŭ ĉe la B.E.S. Adresaro, Potštejn, Ĉeĥoslovakio. Detala, ilustrita 14-p. prospektio senpage.

GRUMBLOJ.

En la ĵus ricevita jarlibro de la UEA ne troviĝas "La Suda Kruco" en la listo de Esp-aj gazetoj. Ni tiras atenton de la koncernaj, petante ĝustigon noton en plej frua n-ro de "Esperanto."

Ankaŭ la Pariza mondkongreso Esperanta pasintĝis sen ajna mencio en la Melburna ĵurnalaro. Pro kio ĉi tiu nescio aŭ ignoro?

NIA POSTO.

BES.—We would inform all who have sent addresses and photos for the BES-adresaro that the edition for 1932 was printed in June; so their additions cannot be incorporated in the publication until some time next year. All matter received on this behalf will be carefully despatched by the agent.

Sudulo.—Laŭ "La Orienta Revuo" la 3a volumo de la Fabeloj de Andersen, trad. de Zamenhof, estas aĉe komposita, plena de presaraj. Tio estas vera honto por tiuj respondecaj kaj meritas akran riproĉon flanke el la gusta aŭtoritato.

Libér.—Recenzo de "Tra sovaĝa Kamĉatko" aperos en la postaĝusta n-ro.

To our correspondents.—Please send Club notes, etc., before the 28th of each month.

N. en 5.—Ni ne dubas, ke "silvestra" estas la adjectivo de "Silvestro" (angle Sylvester), kiu estis papo de 314-335j kaj poste enkanonigis. Lia tago estas la 31a de Decembro. Jen ekzemplo de la utilo uzi grandan komencilon ĉe adjectivoj devenintaj de personaj nomoj.

M. en 7.—Ĉiam skribu aŭ parolu jene: rivero Darling, strato Collins, urbo Geelong, ne "la Darling-rivero" k.t.p.

Al A.—Angloj ofte uzas "dum" erare anstataŭ "en". Ekz., Dum 1930 aligis 30 novaj anoj (En 1930...); Dum la nokto mi aŭdis paŭlon (En la nokto...).

"Dum" kiel prepozicio signifas "en la daŭro de la tempo menciita."

P. en Ol.—Vi diras, ke rusa E. gazeto uzis "antaŭ atingi" anstataŭ la ĝenerale uzata "antaŭ ol" kun infinitivo. En la angla lingvo la infinitivo ofte povas anstataŭ gerundian formon (aŭ verbo-substantivan), ekz., Sleeping (aŭ, to sleep) is necessary (en Esp-o. La dorm(ad)o, aŭ, dorm(ad)i, estas neces-). Povas esti simile aŭ same en la rusa lingvo; se jes, la vinkinto eble rigardis "antaŭ atingi" kiel egalan kun "antaŭ (la) atingi ĝis la stacio," aŭ, "antaŭ atingo la stacion."

Iam...

En 1788 gazeto publikigis en sia unua numero jenon:

"Multaj homoj diras al la ĵurnalisto: "Distru nin per ĝajnaj aferoj, se vi deziras, ke ni aĉetu vian gazeton! Aliaj skribas: "Evidu vin okupi pri bagatelaj!"

... Unu leganto konsilis al ni trakti laŭ serioza maniero seriozajn aferojn, sed alia skribis al ni, ke li ne havas paciecon nek tempon por legi sciencoplenajn raportojn, kiuj tute ne logas lin.

"Se ĉiuj povus sin loki en la apogseĝo de la ĵurnalisto, se ĉiuj povus koni ĉiujn ĵuĝojn kaj ĉiujn konsilojn, kiujn oni donas al ili, oni baldaŭ konstata, ke estas nur unu rimedo por konservi siajn legantojn: fari kiel eble plej bone por servi al kiel eble plej multe da homoj..."

Ni diras, ke tio ĉi estis skribita en 1788...

(El "La Movado.")

EL LA "POLA ESPERANTISTO."

Ĉiunonate ni aperigos prozpecon el fremda Esperanto-gazeto. La celo de tiu estas duobla: provizi legindaĵojn por niaj legantoj, kaj elmontri la veran internaciecon de Esperanto. La jena peco aperis en "La Pola Esperantisto," Oktobron, 1931. Ĝi estas elektaĵo el la verkoj de Wladyslaw St. Reymont esperantigita de s-ro Tad. Hodakowski.

LA TAGO DE MORTINTOJ.

Venis la tago de mortintoj—griza, sensuna kaj senviva, ke eĉ la vento ne peladis sekigintajn branĉetojn kaj ne ŝancelis larbojn, kiuj staris peze klinitaj super la tero . . .

Kaj en la vilaĝo jam dematene la sonoriloj batis malrapide kaj senŝese, kaj malĝojaj, dolorplenaj sonoj ĝemadis sur nebulkovritaj, malplenaj kampoj: per deprimita voĉo de funebro ili vokadis en tiu ĉi melankolia tago . . .

Posttagmeze al vespera diservo, kiu estis celebrata unufoje dum jaro en la tombeja kapelo, ekmarŝis ĉiuj de la knabinoj de Boryna.

Iris ge-Antonioj kun infanoj, iris geforgistoj, iris Jonjo kaj Jagustinoj, kaj ĉefine lampasĉi Kuba kun Witek, por tiun ĉi solenan tagon ĝui ĝisfunde.

La tago jam ekfermis grizajn, lacajn palpebrojn, estingigadis kaj enprofundigadis malrapide en angorian malĝojan profundegon de l'krepuskoj; la vento ekmovigis kaj tiradis sin tra kampoj kun ĝemo, bruas inter la arbustoj.

Estis mallaŭte . . . Homamasoj iris la vojon en severa silento, nur bruo de piedoj aŭdigadis obtuze, nur la arboj apudvojaj ŝanceligadis maltrankvile, kaj kvietas sed doloriga susuro de branĉoj tremis super la kapoj, nur tiuj muzikadoj kaj donacpetaj kantoj de almozuloj ploris en aero kaj faladis senŝese . . .

Antaŭ la pordego, kaj eĉ inter la tombomontetoj apud la muro staris vicoj de bareloj, kaj ĉe ili instaladis sinaroj da almozuloj.

Kaj la popolo fluas la vojon sub la poploj al la tombejoj; en krepusko brilatadis lumoj de kandeloj, kiujn havis kelkaj kaj ŝanceligadis flavaj flamatetoj de buteraj lampetoj, kaj ĉi, antaŭ ol eniri la enterigejon, elprenis el sako jen fromaĝon jen peceton da lardo aŭ kolbaso, jen bobenon da ŝpinajo aŭ manprenon de kombita lino, jen laĉaĵon da fungoj kaj metadis ĉion pie en la barelojn—kaj ili estis tiuj de

l'pastro, estis de orgenisto kaj be Ambrozio, kaj la ceteraj de almozuloj, kaj kiu en ilin nenion metis, tiu enprenis iun groŝon en la etenditajn almozulajn manojn kaj flustris nomojn de mortintoj, por kiuj li petis preĝon.

Horo de preĝoj, kantoj, nomoj rememorigataj per ĝema ritmo, altiĝadis ĉiam super la pordego, kaj la homoj preteriradis—iradis pluen, disigadis inter la tombomontetoj, kie baldaŭ lumetoj komencis brileti kvazaŭ lampiroj kaj flagri inter la krepuskoj kaj densaĵoj de arboj kaj sekigintaj herboj.

Obtuza, timeme mallaŭtigita flustrado de preĝoj vibris en la surtera silento, kelkfoje doloriga plorego leviĝis de la tombomontetoj, kelkfoje plena lamento serpentumis en disiraj tordadoj inter la krucoj; aŭ iu krio subita, mallonga, ŝvelinta pro malespero kiel fulmotondro disiris la aeron aŭ mallaŭtaj ploradoj infanoj—orfaj peplendis en kovritaj per krepusko densaĵoj kvazaŭ birdidoj . . .

La homoj vagadis inter la tombomontetoj mallaŭte: flustradis timplene, kaj timeme rigardis la krepuskantan, senfundan forjaŝon.

"LA LASTA RAJDO DE LASSETER"

de Ion Idriess

(eldonita de S-roj Angus and Robertson, Sidnejo).

Ĉi tiu libro, unue eldonita en Septembro, 1931, kaj poste en sep pliaj eldonoj, estas vera rakonto pri mistera ora rifo, pli romana, pli viva ol iuj, kiuj venis el la imago. Antaŭ pli ol tridek jaroj, Harry Lasseter, juna kaj entuziasma, sin perdis ie en la Aŭstralio dezerto, kaj hazarde trovis ĉi tiun rifon riĉan je oro. Li kolektis kelkajn specimenojn kaj komencis sian revenon al civilizo. Sed li denove perdis sin en tiu senkompataj lokoj, estis retrovita de kamelondukisto, kaj alportita, freneza pro soifo, al kampara loĝejo en Okcidenta Aŭstralio, kie amiko lin zorgis ĝis resaniĝo. Post tri jaroj li kaj la amiko retrovis la rifon. S-ro Harding, la amiko de Lasseter, estis lerta termezuristo kaj li fiksas la orientiĝon de la rifo per helpo de kronometro. Sed kiam ili revenis al Carnarvon ili trovis, ke la diferenco inter siaj horloĝoj kaj la tieaj estis unu horo kaj dekkvin minutoj. Ĉar la horloĝoj estas malfidindaj, do la kalkuloj estas sen-

valoraj. Ankoraŭ unufoje la rifo perdis.

La jaroj forpasis, kaj Lasseter konservis sian sekretojn ĝis 1930, kiam, post multaj malkontentiĝoj, li fine starigis kompanion, kaj bone ekipita ekspedicio formarsiis de Alice Springs kun Lasseter kiel ĉefo por plenumi la revon. Kun li estis kvin viroj, ĉiu el ili specialisto en sia propra profesio. Ili veturis per ŝarĝavagono, kaj kunlaborante kun ili estis aeroplano, kiu antaŭen-iris ilin por serĉi akvon kaj vojojn. Neniam pli bone aranĝita kaj ekipita aro ekiris en la dezerton, sed mankis nur unu afero—la bansonco. La aeroplano falegis, kaj la piloto severe vundigis: tiuj sur la tero devis blinde antaŭeniri: kaj la timoj, ke la orientiĝo ne estas korekta pruvigis ja tro veraj. Ili sin trovis 150 mejlojn tro norde. Suden ili turnis sin kaj daŭrigis la vojaĝon ĝis la nekonata lando kaj fine alvenis al absolute nepasebla loko. Nenia aŭtomobilo povus trapasi tie: ŝajne eĉ ne kamelo. La aliaj decidis reiri, sed Lasseter rifuzis. Li antaŭeniris, prenante kun li Paul Johns kaj liajn kamelojn. Estis ĉiama danĝero de nigroloj kaj la soifo, sed li do persistis, kaj unu memorindan tagon Lasseter rekonis la longe perditajn landsignojn. Li resendis Paul Johns al Alice Springs, kaj kun de kameloj antaŭeniris sole. Li trovis sian rifon, faris la necesan leg-signon, fotografis la lokon kaj kolektis specimenojn—kaj tiam liaj du kameloj forkuris! Li estis sola en la dezerto sen nutraĵo aŭ akvo. La cetero de la historio temas pri la barakto de Lasseter por sia vivo: inkubo de suferado, de mizero, de espero prokrastita. Li trovis tribon de indiĝenoj kruelaj kaj minacaj: sed lia sola vivespero estis kun ili, kaj li kurage kaj maltime sin altrudis sur ilin. Dum kelkaj monatoj li atendis morton je iliaj manoj. Fine kiam li estis kripligita, preskaŭ blindigita de la sabla pesto kaj eĉ forlasita de la nigroloj la fino venis. Sur la arbo sub kiu restis lia korpo estis sago elmontrante la lokon, kie li enterigis sian taglibron, nevre la plej kurtusa dokumento iam ajn skribita. Per ĝi kaj la diversaj leteroj, kiujn li skribis kaj enterigis diversloke dum siaj vagadoj kun la tribo, ĉi tiu plej interesa libro verkiĝis.

Ĝi ankau enhavas multan informon pri la moroj kaj kutimoj de la nekonataj indiĝenoj de Aŭstralio kaj estas

bone kaj plene ilustritaj per fotografaĵoj.

Lassester estas mortinta, sed lia laboroj postvivis lin. Nun venas raportoj, ke lia perdita rifo troviĝas en la Granitoj, ĉu izola aro de montoj sude de Tanami, kie estas nek akvo, nek nutraĵo, nek paŝtaĵo, kaj kie viroj mortrikas siajn vivojn, kiam ili aventuras en la dezerton. Dume, eble Lassester en sia sola dezerta tombo, aŭdas la gruntdon de la kameloj, aŭ la zumon de la aeroplano dum la oreksploristoj, sekvante liajn piedpaŝojn, alvenas por kolekti la ricegaĵojn, kiujn la sorto rifuzis al li.

—E.G.

BAGATELAĴOJ.

Profesoro Einstein, la plej fama matematikisto en la mondo, iam argumentis kun tram-konduktoro germana. Li diris ke la monrestaĵo donita al li de la konduktoro estas malĝusta, sed tiu pruvis, ke la profesoro estis malprava, kaj aldonis:—“Mi vidas, ke vi ne scias multon pri aritmetiko, sinjoro.”

SIMPLA VORTOJ.

Doktoro, bonvole diru al mi sincere tion, kion mi suferas. Ne per latinaj aŭ grekaj vortoj, sed per la simplaj, ĉiutagaj.

Vi havas nian malsanon, sed vi estas drinkulo kaj manĝegemulo fitroa.

Kaj nun bonvole diru tion en latino aŭ greko, por ke mi povu diru ĝin al mia edzino.

PLI GRAVA.

Politikisto: Tiuj gazetoj rakontas abomenindajn mensogojn pri mia persono.

Amiko: Ili estus povintaj fari pli grave.

Politikisto: Ankoraŭ pli grave! kiel do?

Amiko: Ili estus povintaj skribi la veron.

Dekses fraŭlinoj de la urbo Charleston en Usono en la jaro 1733 prezentis petadon al la gubernatoro petantan lian helpon kaj influon por malebligi la vidvinojn, ke ili ree edzinigu ĝis la fraŭlinoj proviziĝis per edzoj, kaj ke li monpunu la ofendantinojn, se li ne povas doni pli severan punon. La petado uĝis: “Estas granda malprofito al la fraŭlinoj, ke la vidvinoj per sia sintruda konduto kaptas la junulojn kaj estas sufiĉe memferaj pensi, ke iliaj meritoj estas pli ol la niaj; ĉi tiu estas forta malĵustaĵo al ni, kiuj devus havi la unuan ŝancon.”

Kiel rapide veturas la sonon? Tio dependas: la maŝonorio ekzemple rapidiĝas tra la aero po duonmeĵlo ĉiusekunde, sed la leviĝonorio kelkfoje eluzas duonhoron nur por supreniri unu ŝtuparon en la mateno, kaj tiam ne restas en ĝi sufiĉa forto por la aŭdado.

Romanaj soldatoj de antikvaj tempoj kaptis aron de malamiko kaj alportis ilin al la tendaro. “Piktoj kaj Skotoj ili estas,” diris la gardisto. “Sed kiel vi povas distingi inter ili?” demandis la ĉefoficiro. “Mi tute ne povas vidi diferencon.” “Nu, sinjoro,” respondis la gardisto, “ni kutime ĵetas inter ili kelkajn monerojn. La Piktoj neniam havigas al si iujn.”

(Note: La skotoj havas reputacion esti homoj tre avajaj.)

Dommastrino, al nova servistino: Ĉu vi scipovas servi al la gastoj?

Servistino: Jes, sinjorino—ambaŭmetode.

Dommastrino: Ambaŭmetode?

Servistino: Jes, sinjorino, tiel ke ili revenos, aŭ tiel ke ili forrestos.

Junulo sub granda ombrelo

Kuregis en pluv' al hotelo,

Sed sub la kalkano

Troviĝis banano:

Nun kantas li en la ĉielo.

POR KELKIES INFORMO.

El la redakto de “La Suda Krucio” iras perfekta ĉo de la jena, eltranĉita el “Oomoto Internacia”—

“La legantoj ŝatas senearan kaj bele presitan ĵurnalon, sed malmultaj el ili konas la grandan laboron de la ĵurnalistoj. Multaj legantoj eble mirus, kial la redaktoroj postulas klarajn manuskriptojn, grandan margenon, legeble skribitajn proprajn nomojn ktp. Ĉar ĉi ĉio estas de si mem interesa, ni donos kelkajn informojn pri la preparo de ĵurnalo, prenante kiel ekzemplon nur unu artikolon, kiun verkis kaj sendis ekstera kunlaboranto. La artikolo estas bona kaj publikiginda, sed skribita ne tre legeble mane. La redakcio do transskribigas ĝin permaŝine, korektigas ĝin ĉiufanke, t. e., konformigas ĝin laŭ ĉiuj postuloj de la gramatiko kaj la sintakso, sen ŝangi la frazaĵojn sencojn, kontrolas la historiajn kaj kronologiajn faktojn, la ortografon de dubaj propraj nomoj ktp.; unuovite, adaptas ĝin por la transdono al la preseo. Post tralego kaj korekto de du presprovaĵoj sinsekvaj, la artikolo estas jam preta kaj liverata al la legantoj, kiuj, legante ĝin, se tio okazas, trovas nature, ke ĝi estas bone farita, ne konsiderante, ke la artikolo spertis tiom da zorgo kaj tralaboro.”

ATENTU SINJORINO!

Diraĵoj pri Virinoj:—

Ŝaĝa virino atingas sian celon per tio, kion ŝi ne diras.—Vachell.

La viroj povas elporti la grandajn sortbatojn, sed sub la senombraj bagatelaj ĝenoj de la vivo, la virinoj kutime montras pli da memkontrolo kaj morala fortoco. Kia estus la vivo de virino, kiŭ ne povus elporti la kunestadon de teduloj kun agrabla rideto; elporti la ĝenojn de infanoj kaj servistoj kun bonhumora mieno, kaj forigi koleran vorton per mola respondo.—S. Laing.

La Legendo pri la Unua Akusistino.

En antikva Ateno estis dekretita, ke neniu sklavoj aŭ virinoj estu permesata lerni la kuracarton. Sekve multaj virinoj, pro modesteco, rifuzis la helpon de virkuracistoj, kaj mortis dum naskado. Juna knabino, Agnodice, dezirante helpi al siaj suferantaj fratinoj, detranĉis la harojn, surmetis virajn vestojn, kaj iris al doktoro, kiŭ instruis al ŝi ĉion, kion li sciis.

Post nelonge, aŭdante virinon kriegi pro doloro, ŝi vizitis ŝin, sed la suferantino, pensante, ke Agnodice estas virino, rifuzis la proponitan helpon, ĝis kiam Agnodice donis pruvon pri sia sekso. Iom post iom la virinoj de Ateno aŭdis pri tio ĉi, kaj Agnodice estis senĉese venigata, je la granda indigno de la kuracistoj, kiuj akuzis ŝin, ke ŝi korpitis siajn pacientojn. Agnodice estus kondamnita, se ŝi ne estus pruvinta sian sekson. Tiu ĉi kolerigis la kuracistojn tiom, ke la ĉefaj virinoj de Ateno iris al la juĝejo kaj diris:—“Vi ne estas edzoj, sed malamikoj, ĉar vi kondamnas ŝin kiu estas savinta niajn vivojn.”

Nur estis tiam, ke la Atenanoj aliĝis sian leĝon, kaj ebligis la studadon de la kuracarto al virinoj libere naskitaj.

—M.C. (El la “Woman’s Mirror”).

DU RECEPTOJ DE FREMDAJ SAMIDEANOJ.

Ovoj Turkaj.—Batmiksus ses ovojn kun salo kaj pipro, kaj metu en poton kun peceto da butero: metu sur fajron ĝis ili firmiĝas, tiam metu ilin ĉirkaŭ la randon de plado. Preparu iom da hepato (kokida, porka aŭ bovida), fritu ĝin, pecetigu kaj gustigu per bulbo kaj petroselo, metu en la mezon de la plado. Elverŝu varmegan tomatan saŭcon sur ĝin kaj tuj priservu.

Hispana Salado.—Tranĉu ses malgrandajn firmajn tomatojn, tri kuiritajn termpojn kaj unu beton en maldikajn tranĉaĵojn. Metu en pelvon aldonu flavaĵon de tri malmole bokitaj ovoĵ etpece tranĉitaj kaj unu plantoson da francaj fajboj en mallongaj pecoj. Gustigu per pipro, salo kaj la kutima salada garnajo.

La toasto de la Presistoj.—Al la virinoj! La plej bonaj dissemistoj de novaĵoj, post la gazetoj.

DEMANDOJ.

- (1) Kiu estas la plej granda lago en la mondo?
- (2) Kiu estas la plej malalta enombra temperaturo registrita en Aŭstralio?
- (3) Kiu estis la unua Laborparitia ĉefministro de Aŭstralio?
- (4) Kiom ampleksas ŝtato Viktorio?
- (5) Kio signifas "la 100 tagoj" en franca historio?
- (6) En kiu loko estis la unua blankula kolonio en Aŭstralio?

FINE LI MORTIS.

"Post du-tri minutoj mi min mortigos..." Tie li haltis. Eble estus pli bone, se li skribus ian kialon. Jes, li ŝuldis tiom al siaj parencoj, al siaj amikoj; ili volus scii, pro kio li ĝin faris. Li devas elpensi ian konvinkigan kialon. Kialo, kialo! La veran kialon li kompreneble ne povis diri. Ŝia nomo devis resti tute ekstere de tiu ĉi afero. Ne estus noble ŝin menciigi; kaj li nepre devas esti nobla. Mankus al morto ne nobla kaj romana tia beleco, kia merite apartenas al la sinmortigo de tia prezentinda junulo, kia li mem. Efektive, estis ĉio malĝoja. Antaŭ li lia tuta vivo, lia nomo ĵus konigitanta en la literatura mondo, kaj nun morti. Estis ja tre malĝoje. Ĝi aspektus bona en la gazetoj. "Promesplena junulo. Lia tragedia morto." "La Mondo Perdas Junan Geniulon." Sed kompreneble neniu kun escepto de li mem iam scios la veran kialon. Bedaŭraĵo. Li ŝatus, ke almenaŭ ŝi scius, kiel tragedie lian vivon ruinigis ŝia edziniĝo. Kiel ŝi povis ĝin fari! Dika, grasa Bleistein! Kaj ŝi tiel ĵuna, tiel bela. Tiu nokto en la montetoj: la lunlumo ĉio tiel trankvila, tiel neparoleble sur ŝia hararo, brilanta en ŝiaj okuloj, romanplena. "Ĉu ne bele?" li estis dirinta. Nur memoro de la sunsubiro tremis sur malproksima monto. "Jes," ŝi estis respondinta, "kun escepto de la moskitoj, jes." Tia viro, kia Bleistein neniam povis ŝin dece estimi; ne ekzistis en li poezio. Kio li estis? Sapfabrikisto! Kredeble li mangegis.

Estis terura mondo, kiu ebligis tiajn aferojn, ja malĝoja mondo. Li ekrigardis tra la malfermita fenestro en la ĝardenon. La suno diluvumis tra la verdaj arboj kaj hele briligis la florojn. Du hundidoj petolis energie sur la herbejo. Bela tago, beleaga tago. Preskaŭ estis bedaŭre ĝin forlasi en tia tago. Kialo, kialo! Kion kredeblian li povis skribi? Li havis monon; ne tre multe, sed tamen sufiĉe, kaj lia nova verkaĵo akceptite, li havis bonajn ŝancojn havigi pli multe en la estonteco. Li havis multajn amikojn. Lia sano ne povis esti pli bona. Sed lia amivivo! Ho ve, ke du helaj okuloj turnataj malice al la malĝusta viro malplenigas ĉion alian. Neniam ekzistis antaŭe okuloj tiel helaj kaj fulmetadantaj, kiel la ŝiaj. Kun escepto de, eble... Kiu estis tiu fraŭlino en la preĝejo lastan dimanĉon? Ŝiaj okuloj ridantaj al li iomete lin konfuzis. Ili tute malaraĝis lian pozon de meditanta melankolio. Ŝi vizitis ĉe Evans. Milledge, Milledge, Frances Milledge. Jes, Frances Milledge ĝi estis. Placa nomo. Paĉa fraŭlino ŝajne. Almenaŭ, ŝia buso aspektis tre plaĉa. Kial ŝi ridis al li en la preĝejo? Li sciis, ke ŝi lin ridis. Se li ne intencis sin mortigi tian posttagmezon, li ŝatus solvi la misteron de tiu bonhumora buŝo. Estus tre distre.

Nu, ŝajnis kvazaŭ li devis morti sen kialo. Oni trovis lin mortinta, malgaja kaj moka rideto sur liaj lipoj, kaj sur la tablo antaŭ li letereton dirantan, ke li estas mortinta per sia propra mano, kaj ke al neniu apartenis kulpo. "... dum li estis ne cerbosana." Ne, eble estus pli bone, se li elpensus ian kredoblan kaj romanon kialon. Li mortis pecon de la maldika ekstremajo de sia plumo kaj kraĉis ĝin en la paperkorbon. Kialo, kialo! Kondamnu la aferon! Hierau li povus elpensi nil da kialoj, pro kiuj oni sin mortigus. Tiu sunbrilo ĝin faris. Ĝi distris lin. Li tiris la rulkurtenojn kaj revenis al sia seĝo. Heleno intencis festi sian amikan kunvenon dum tiu ĉi posttagmezo. Ŝi certe ne sciis, kiam ŝi lin invitis, ke dum tiu posttagmezo li mortos. Tie ili estos, trinkantaj siajn "cocktails," ridantaj pri siaj stultaj ŝercoj, serioze diskutantaj aferojn, kiuj neniam gravas. Li konsentis iri, kompreneble. Estis ĉio da malafabla ironio en tiu situacio.

Nu, estis nun tute finite. Tia ĉi afero donis al viro novan perspektivon, pli klaran elrigardon. Li vidis la vivon

klare, li vidis ĝian etecon. Kion ĝi povis enteni por li, de post li perdis sian amatinon? Nenion. Ami alian estus profani la belĵon en lia animo. Eĉ pensi pri aia virino estus malinda. Frances Milledge, ekzemple, bela kiel ŝi estis... kaj ŝi ja estis tre bela, li povis memori la lumojn en ŝia hararo, ŝian larĝan, klaran fronton... Kaj ŝiaj lipoj tiel bone, kiel li povis vidi per la malhela preĝeja lumoj, estis preskaŭ, fakte, tute tiel ruĝaj, kiel... Sed ĉi tiamaniere li ne trovis kialon. Kialo, kialo! La ĉambro farigis iomete malĝusta. Li iris al la fenestro kaj levis la rulkurtenojn denove. Ankoraŭ hele brilis la suno, la hundidoj pace dormis unu flanko de la alia. Li ankaŭ perceptis, gracie marŝantan laŭlonge de la strato, Frances Milledge. Sendube ŝi iris ĉe Evans. Nu, eble li povos morgaŭ elpensi kialon. Rapide li forlasis la ĉambron.

Post kvardek jaroj li mortis pro renomlanso. Liaj dek-sep genejoj ĉeestis lian funebtron kaj ploris ege.

—"KINO."

KORESPONDADO.

Instruisto de elementa lernejo deziras korespondi kun eksterlandaj geesperantistoj. Adreso: Rud. Beckman, PALAMUSE, Varbvere, Eestka.

MALMULTE KONATAJ VORTOJ DE ZAMENHOF.

(n-ro 3)

Al s-ro P. en Saratov.—Mi miras, ke mi jam longan tempon havas de vi nenian leteron. En la lasta tempo mi ofte rimarkas, ke leteroj skribitaj de amikoj al mi aŭ de mi al amikoj—perdis en la vojo, kaj de tiu ĉi venas neatenditaj malagrablaĵoj. Ricevinte de mi nenian respondon je sia lasta letero, la korespondanto ofendiĝas aŭ timas, ke li estas maloportuna al mi per sia skribado, kaj tial li ĉesigas sian korespondadon. Sed se iu ne ricevas de mi respondon, la kulpo plej parte estas ne mia. Per ĉiu, eĉ per la plej sensignifa, letero la amikoj de mia afero alportas al mi ne malkontenton, sed nur plezuron, kaj mi respondas ĉiun leteron, kiam mi nur trovas minutojn da tempo. Tial mi nun trovas la okazon kaj petas ĉiujn, kiuj skribas al mi leterojn kaj ke ricevas respondon—ke ili ne vidu en ĝian malĝentilecon aŭ ferecon de mia flanko, sed ke ili diru al si simple: kredeble li ne ricevis mian leteron aŭ mi ne ricevis lian respondon, kaj tial mi skribu al li ankoraŭ unu fojon. Al mi oni povas skribi leterojn eĉ la plej longajn; tamen se mi mem iam skribas tro mallonge aŭ malfrue, oni volu pardoni al mi, ĉar mia tempo estas tre okupita.

("Originala Verkaro de D-ro Zamenhof," p. 72.)

RESPONDOJ.

- (1) Lago Superior, Kanado.
- (2) Ok gradoj sube de zero, ĉe Kian-ora, Nov-Sud-Kimrujo, Aŭgusto, 1872.
- (3) J. C. Watson.
- (4) 87,884 kvadrataj mejloj.
- (5) De Marto 1 ĝis Junio 18, 1815, la tempo inter la forkuro de Napoleono el Elba kaj la Waterloo-batalo.
- (6) Botany Bay, Sidnejo.

MENCIOJ.

Evangelio de Homar-sinkompletigo, de Olamato-Rikiĉi, Belisma-Koopera-Kulturo, Tomioka-mura, Suntoogun, Siozoka-ken, Japanujo. Eble interesos al psikologoj. Verkita de pensema homo, multe studinta. Stranga miksaĵo da fizik-, ekonom-, kaj animhigienaj sciencoj. Neapanjo ne facile rekonas en "Pludon" la nomon "Prudhon" (franca socialisto, 1809-1865).

ESPERANTO AND THE INTELLECTUAL.

One would be justified in expecting that scholars, scientists and suchlike workers in the field of thought would be the first to approve the adoption of one sole language for international relations and for technical publications of world interest. And as agreement in the choice of a modern language for that purpose is impossible owing to national amour-propre, and as the employment of a dead language for that end has proved so unsatisfactory that Latin has for the second time gone into practical obscurity, one would be further justified in thinking that the intellectual world would afford its support to the idea of an artificial language, to a specific system, especially if that system, having been practised long enough to prove its fitness for the task, had become a truly living language, daily employed by thousands of people and possessing that inherent quality which enables the natural languages to resist changes and tendencies hurtful to their steady evolution.

The Esperanto of to-day is such a language, but suspicion in scholarly circles is still felt. The cause of this is none other than the prejudice that Esperanto is only a rudimentary jargon, used by boisterous tourists or uncultured traders, a jargon standing midway between a language of telegraphy and a signal code. Let me tell of a personal experience. About a year ago I collaborated in compiling an Esperanto-Esperanto dictionary, in which I was charged among other things with the phonetics portion. I shall never forget the stupefaction with which one of my colleagues, whose advice I had sought on certain doubtful points, asked me: "But surely you cannot formulate in Esperanto the definitions of phonology!" To use an artificial language in the field of science was as unthinkable to him as to use a boot brush wherewith to copy the "Jocande."

The origin of such prejudice is clear.

By crying from the roof-tops that Esperanto is so prodigiously easy to learn; that it has only 16 rules and that it can be spoken after five or six hours' study, propagandists have set up in the minds of reasoning people the suspicion that a tongue so easily mastered can be no more than a very crude linguistic instrument, incapable of expressing the range of human thought.

The whole trouble, to my mind, lies in the equivocal nature of the expression "to know a language." If "to know Esperanto" is to know how to ask for one's coffee or one's way, to ask if it's raining or if the newspaper has come, then one can "know" Esperanto after a few hours' perusal of a text-book. But if to know Esperanto means to speak and write it with the same freedom and grace as you your native French, to apprehend the spirit of the language and its power to express the most delicate nuances, then one or two years of serious study is not too much. What remains true is this, that, compared with the so-called natural languages, all other things being equal, Esperanto is four or five times as easy to learn as any of them (1). But its facility is such that it in no way excludes the bringing out of delicate distinctions and fine shades of meaning, and all that supple play of verbal analogy and semantic variation which liken a language to a piece of beautiful moire, on which the light calls forth colors that shimmer and undulate in indefinable change. (Trans. from "L'Esperanto et la Stylistique," by Professor G. Waringhien, Lycee de Lille).

(1) Professor Waringhien's assertion here is too loose and unscientific to be of much practical help in the discussion. It is, for instance, far easier for an Englishman to learn Spanish or Dutch, Italian or German, languages related intimately to his own, than for him to learn Turkish or Hungarian, Finnish or Japanese, non-Aryan tongues, wholly dissimilar to English. A more careful statement of the relative difficulty of Latin, French, Spanish, Esperanto, German and Russian appeared in "Amerika Esperantisto" for April, 1929. See also Clark's "International Language," 1912 (Note of transl.).

LINES FROM OUR LITERATURE

"En la t.n. civilizitaj landoj jam de pluraj jarcentoj ne plu ekzistas puraj rasoj je la biologia signifo de l'vorto."

"Se povus kunekesti socialisma ekonomio en Sovetio kaj kapitalisma en ceteraj landoj—kio ŝajnas al ni tre dubinda—estas tre verŝajne, ke kreigis en Sovetio ia danĝera patriotismo."

"Se ni ekzamenas la vivkondiĉojn de la proletoj el la "liberigitaj" nacioj kiel Ĉeĥoslovakio, Estonio, Finnlando, Irlando aŭ Polio, ni konstatas, ke ili neniel estas pli bonaj ol antaŭ la nacia liberigo" (la tri citoj el "Manifesto de la Sennaciistoj").

"Ne diru al viaj lernantoj, ke nia lingvo estas facile ellernebla... Diru,

ke oni tre facile k rapide povas interkompreni per esperanto, sed ke necesas multaj jaroj nur por ekvidi, ke nuntempe neniu homo funde scipovas la artefaritan lingvon."

"Mi legas la Biblion por lerni... esperanton. Kaj ĉe tia legado mi konstatas, ke Zamenhof mem lernis sian lingvon ĝis la lasta spiro."

"Por ricevi instruon el la legado de gazetoj, oni devus legi nur malnovajn. Se deklare malnova artikolo estas ankoraŭ... aktualita k interesa, aŭ se la "profetaĵo" de la aŭtoro realigis, la artikolo certe estas legenda."

"Malmulte da tiaj artikoloj troviĝas en la ĵurnaloj, precipe en la ĉiutagaj. Tial oni plej ofte perdas tempon en la legado de gazet-artikoloj." (Vortoj de E. Lanti)

"Esp-a legado por preskaŭ ĉiuj, kiuj ĝin estas, estas ekcerkaĵo; tial (por la recenanto) la gramatika flanko de libro Esp-a estas ĝia ĉefa." C. L., en "Germana Esp-isto."

"Mi diru al la rusaj amikoj, ke, ĉe se oni konsideras religion opio de la popolo, oni devas respekti la rajton de ĉiuj fumi kion ili volas—mem ne fumante." J. G. C. en "Kataluna Esp-isto."

"Malpermeso ĉiam elvokas spiton. Ĉu la dekalogo mem ne konsistas el dek allogoj?" (R. S. en "La Gazeto de la 24a").

"Ĉiam ni citas labiletere, "t.n." signifas "tiel nomataj"; "k" estas mallongigo de "kaj," ofte uzata en "proletoj" kaj rusaj verkoj.]

From 3 L.O.

The following anecdotes will be broadcast from 3L.O., Melbourne, on the dates mentioned. (See announcement "Esperanto and Radio in Australia.")

October 15th.

Gasto: "Nur rigardu ĉi tiun malpuregan viŝtukon!"

Hotelmastro: "Kio estas al ĝi? Centoj da personoj jam uzis ĝin kaj ne plendis."

October 29th.

Kliento (kunsente): "Mi tre bedaŭras sciigi pri via vidviniĝo. Sendube vi tre sentas la foreston de via edzo."

Butikistino: "Ho, jes, sinjoro, estas al mi tre strange trovi monon en la kaso."

MALGRAŬ LA KRIZO "OOMOTO" PROGRESAS!

Komence de Julio nia gazeto aperas sur 48 paĝoj kun interesa enhavo. Konstantaj kolonoj pri Japanujo, Vojaĝoj, Literaturo kaj Filozofio. Senpartiaj recenzoj, belaj ilustraĵoj, konstanta progreso. Ni bezonas viajn abonon kaj kunlaboradon! Petu senpagan specimenon el la nova serio de "Oomoto" al "Oomoto" Kameoka (Kioto-hu) Japanujo.

POR LA KOMENCULOJ.

LA CIKONIOJ.

Sur la lasta domo en vilaĝo estis nesto de cikonioj. La cikonia patrino sidis en la nesto kun siaj kvar idetoj, kiuj elstreĉis siajn kapojn kun nigraj beketoj, ĉar ili ankoraŭ ne rugis. Tre apude, sur la rando de la tegmento, staris la cikonia patro, tute rigida, kun unu kruro kurbigita sub li, por ke li, tamen, povu ĝenu sin dum li gardis la familion. Ŝajnis kvazaŭ li skulptiĝis el ligno, li tiel senmove staris.

"Certe aspektas tre grandioza, ke mia edzino havu tian gardanton apud la nesto," li pensis, "ĉar neniu povas scii, ke mi estas ŝia edzo, sed ili nepre pensos, ke oni ordonis min staru tie: aspektas bone." Kaj li kontente stiris per unu kruro.

En la strato maŭntaŭe, aro de infanoj kune ludis, kaj kiam ili vidis la cikoniojn, unue unu el la plej kuraĝaj el ili, kaj poste ĉiuj kune kantis la antikvan rimajon pri la cikonioj, sed ili kantis ĝin precize, kiel ĝi eniris la kapon de la unua kantanto:

"Cikonioj, flugu hejmen nun,
Ne mallaboru sub la lun',
Edzino via sur la nest',
Varmigas idojn per plumvest'."

(Daŭrigota)

THE STORKS.

On the last house in a village was a storks' nest. The stork-mother sat in the nest with her four little ones, which stretched out their heads with the little black beaks, for they had not yet become red. A little way off, on the ridge of the roof, stood the stork-father, quite stiff and rigid, with one leg drawn up under him, so that, at any rate, he might have some trouble in standing as he kept watch. It seemed almost as if he were carved in wood, he stood so still.

"It must certainly look quite grand that my wife should have a guard near the nest," he thought, "for no one can know that I am her husband, but they will surely think that I have been ordered to stand here: it looks well." And he continued to stand on one leg.

In the street below a troop of children were playing; and when they saw the storks, first one of the boldest of them, and afterwards all together, sang the old rhyme about the storks, but they sang it just as it came into the first singer's head:

"Storks, storks, fly home, I beg,
And don't stay idling on one leg.
There's your wife sits in her nest.
Rocking all her young to rest."

(To be continued.)

—E.G.

Westralian Esperanto Society, Perth, W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikajojn al la sekretario.

Masterton Esperanto Club — Meet every Tuesday at 8 p.m. in the Y.M.C.A., Church-st., Masterton. Hon. President, Mr. G. R. Sykes, M.P.; President, Mr. A. Dewar D.B.E.A.; Vice-Presidents, Mrs. McNab and Mr. B. Johns; Secretary, Mr. Howard Franks, 38 Workshop-rd. Visitors always welcome.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro C. Brandon. Komunikajojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, sinjoro P. Hudson; sekretariino, f-ino L. Irwin, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenoj: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Read-

ing Room, Collins-st., post la 18a horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building", 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: s-ro A. W. Peacock; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfah, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbane Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str., proksime de konstruaĵo "State Insurance". Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Viceprezidantoj: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

Wellington Esperanto Club. — Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. E. C. Jack; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanager-cr., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.

OBITUARY.

We have learned of the death of Mr. N. Gaye, of Kent-st., Ascot Vale, one of our foundation members. We forward our heartfelt sympathy to his friends and relatives.

The next number is scheduled to appear on 8th November.

THE NEW SERIES

merits your support, doesn't it? Not that we had reason to be very ashamed of the old. It compared, in content, and even in size, more than favorably with certain national Esperanto organs in countries with six and eight times the population of Australia. We believe we can, with your aid, make "La Suda Kruc" the most interesting and useful Esperanto paper in the British Empire, if not in the English-speaking world. Send along your lapsed subscription and help us to that goal!

HEROLDO DE ESPERANTO.

La plej aktuala, bone ilustrita, kaj grandformatiga gazeto en Esperanto. Semajne aperadas jam de longaj jaroj! Tre interesaj paĝoj privirinaj, turismaj, prilingvaj, porinfanaj, krom la belatraj, regule plezurigas la ĵamajn abonantojn. Abono: 16 ŝil. jare (52 nroj) per B.E.A., al rekte ĉe

"Heroldo de Esperanto," Brüsselerstr. Köln, Germanujo. Petu librokatalogon.